



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 33/1973 21 dec 1973
Aperas ĉiusemajne

PILO-PRESS

deziras agrablajn
festotagojn kaj
ĉion bonan por la

Eldonanto/Herausgeber:

NOVA JARO 1974

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

Esperanto sen penoj

Per grandformata anonco la franca eldonejo ASSIMIL reklamas en "Bibliographie de la France", la oficiala organo de la franca libro-merkato, por sia nova Esperanto-lerno-libro

"L' espéranto sans peine"

Pilo-Press jam raportis pri tio.

COMBAT kontraŭ
Daily Telegraph

Se du kverelas, ĝojas tria... La du estas la angla kaj franca. Temas pri la hegemonia pretendo de la du lingvoj en la Eŭropa Unio. Kvankam la politikistoj asertas, ke ĉiuj lingvoj estas samvaloraj kaj samrajtaj, la praktiko estas alia.

Laŭ informo en Daily Telegraph la belga profesoro H. Janne, komisiita de la eŭropaj instancoj en Bruselo starigi bazprincipojn de komuna politiko pri edukado venis al la konkludo, ke la angla estos la unua laborlingvo de la Komunumaj organoj. Tiun aserton rebatis en tutpaĝa trikolona artikolo André Cocatre-Zilgien, profesoro ĉe la universitato Paris XII. Li pri-skribas kelkajn aspektojn de la lingva problemo, montrante la imperisman karakteron de la angla kaj la danĝeron fontanta el tio. La aŭtoro konstatas,

N° 50/73. 3° PARTIE. ANNONCES BIBLIOGRAPHIE DE LA FRANCE

4567

ASSIMIL S.A.

5, rue Saint-Augustin, 75002 Paris

L'ESPÉRANTO SANS PEINE

- **La langue commune** vraiment internationale < par nature et par destination >;
- **Une communauté** qui s'étend aux cinq continents;
- **Une littérature** de 33.000 titres;
- **Un enseignement officiel** dans 26 universités dont 2 françaises.

Présentation à la presse le **12 décembre 1973**

VIENT DE PARAÎTRE :

L'ESPÉRANTO SANS PEINE

ISBN 2.7005-0035-0

Un volume 11 × 17, 430 pages, relié et illustré sous couverture quadrichromie 27 F

Textes enregistrés sur : 16 disques (en deux coffrets de 8) (disponible courant Janvier) 248 F

ou 4 cassettes 240 F

ou 4 bandes magnétiques 320 F

Pensez à vous approvisionner dès aujourd'hui

ASSIMIL S.A. au capital de 1.000.000 F
5, rue Saint-Augustin, 75002 PARIS, - Tél RIC 48-36

kritikas, sed nenion proponas. Li provas nur veki la francojn.





(RUNDSCHAU-Bild: Hermann Pruis)
Harald Schicken wirbt in Dortmund für die Weltsprache „Esperanto“.

Harald Schicke - Esperanto-sendito

Hamburg (pp) Harald Schicke, juna esperantisto el Hamburg, dum la pasintaj semajnoj verbis por Esperanto en germanaj universitatoj kaj pedagogiaj altlernejoj komisie de la Asocio de germanaj Esperanto-instruistoj. Li vizitis la universitatojn en Bremen, Frankfurt, Mainz kaj Münster, la GHS Paderborn, la TH Darmstadt kaj la PH en Dortmund kaj Köln. Li speciale kontaktis la estrojn de lingvolaboratorioj por sondi la eblecojn pri Esperanto-intensivkursoj. Ĉi-semajne li restadis en la PH Vechta.

La lokaj gazetoj ĝenerale tre detale raportis pri la varbagado de Harald Schicke kaj publikigis favorajn artikolojn pri Esperanto. Speciale oni akcentis, ke Harald Schicke estas la unua germana abituriento, kiu ankaŭ estis ekzamenita en Esperanto. La agado de Schicke estis subtenita de Hermann Behrmann per gazetaraĵ informiloj. Laŭ la gazetaraĵ raportoj oni povas supozi ke la varbovojaĝo de la "Esperanto-sendito" portos bonajn fruktojn.

Zamenhof-festo en Pfaffenhofen

Pfaffenhofen (pp) Malgraŭ la vintra vetero kunvenis en la bavara urbeto Pfaffenhofen pli ol 30 amikoj de Esperanto por festi la Zamenhof-tagon la 15 dec 1973 en la hotelo "Bortenschlager", la kunveno de la novaj esperantistoj de Pfaffenhofen. La sabata posttagmezo ne estis tre konvena, ĉar multaj esperantistoj el Munkeno ne povis veni pro aliaj aferoj. Sed pro la dimanĉa malpermeso aŭtomobili alia solvo ne estis ebla. Elstaris la fakto, ke multaj junaj homoj el Pfaffenhofen kaj ĉirkaŭaĵo ĉeestis. Festparoladeti Horst Spirat, Munkeno, kiu per sindona laboro kaj instruado kune kun Karl Schäch kreis tiun Esperantorondon en la bavara "Hollédau". Ludwig Thalmeier, Landshut, prezentis lumbildprelegon pri Japanujo kaj siaj vojaĝaj spertoj en tiu lando okaze de la tiama Universala Esperanto-Kongreso en Tokio. Ludwig Pickel ĉeestis kun librostando, malgraŭ neĝa blovado li sukcesis bone reveni al Nürnberg, ĝustatempe antaŭ la dimanĉa aŭtomobila malpermeso. (Legu ankaŭ sub "Homoj kaj Nomoj")

Kunveno en Schwelm

La maldekstra foto el "Schwelmer Zeitung" montras partoprenantojn de la Esperanto-kunveno en Schwelm, la 8 dec 1973. Laŭ la raporto gazeta la kunveno estis tre sukcesa. En la foto oni vidas du agantojn el Schwelm: Heinz Schindler kaj Anton Krons-hage (3a resp. 5a de maldekstre). Cetero, Schwelmer Zeitung regule aperigas la EKD-informojn el Nürnberg



Homoj kaj Nomoj

kun kaj sen Renomoj

André Cocatre-Zilgien, profesoro de la universitato Paris XII, en la franca gazeto "Combat" de la 23 nov 1973 opinias, ke la belga profesoro H. Janne, Bruselo, estas apoganto de la nederlande parolantoj de Belgio kaj subfosanto de la franca lingvo en tiu lando (Vidu ankaŭ la titolpaĝon!)

Joachim Kranz, ĵurnalisto, Hamburg, en la gazeto "Die Welt" de la 7 dec 1973 skribis pri la signifo de la venontjara Universala Esperanto-Kongreso por la nova Hamburga Kongres-Centro jene: "La Universala Esperanto-Kongreso kun 3000 partoprenantoj aŭ la kunveno de la Eŭropa Societo por la esplorado de opinio kaj merkato ekzemple povas divastigi la necesan renomon, dancfestoj de regiona karaktero nur plenigas la kason - kaj eĉ tion ne por ĉiam."

Karl Schäch, estro de la esperantistoj en Pfaffenhofen norde de Munkeno, transdonis al Horst Spirat, prezidanto de la Esperanto-Klubo Munkeno, fortikan bierkruçon de la Urbanus-bierfarejo Pfaffenhofen pro liaj meritoj pri la enkonduko de Esperanto en tiu urbo.

Wolfgang Chrometzka, 11-jara lernanto de Pfaffenhofen, deklamis dum la Zamenhof-feston en Pfaffenhofen la Zamenhofan poemon "La vojo".

Ludwig Pickel, eldonanto de Pilo-Press, ricevis la oran ŝtupon de la honora insigno de la Sudbavara Esperanto-Ligo.

Gimnazia profesoro Ludwig Thalmeir kaj Ludwig Pickel fariĝis honoraj civitanoj de Pfaffenhofen, se mi estus urbestro de Pfaffenhofen, deklaris Karl Schäch en sia salutparolado okaze de la Zamenhof-festo en Pfaffenhofen la 15 dec 1973.



Radoje Dakić, 1911 - 1946, estas unu el la du jugoslaviaj esperantistoj, kies protretoj troviĝas sur antaŭ nelonge eldonitaj poŝtmarkoj (Vidu la maldekstran bildon!)

Pastoro Adolf Burkhardt, prezidanto de KELI, Bissingen, translokiĝis nun al la pastora domo, kies plej fruaj partoj datiĝas de la jaro 1599 kaj kiu tamen, post funda renovigo, fariĝis tre agrabla.

Vortoj de esperantistoj

Adolf Burkhardt, prezidanto de KELI: "La poŝta komunikado kun Italujo, kiu parte kulpas pri la malsukceso de la nunjara kongreso, ŝajne ankoraŭ lamas - ekspresa letero de pastro Longoni atingis min post tri semajnoj! Sed mi fidis, ke ĉi-foje ni venkos la barojn." (El decembra cirkulera letero)

D-ro Antonio De Salvo, Romo: "La mensaj kaj ekonomiaj fortoj de la esperantistoj estas plene dediĉitaj al la subteno de nekredbla kvanto da revuoj, bultenoj, cirkuleroj, kiuj - se oni faras kelkajn laŭdindajn esceptojn - estas grandparte remaĉo de la samaj sciigoj..... Tu, oni tiel multe elspezas - materie kaj cerbume - por ke vivetu tiu tuta amaso da ne ĉiam bezonataj gazetoj, kaj samtempe oni ne sufiĉe profitas ĝuste tiujn radio-elsendojn, kiuj finfine estas pagitaj de ne-esperantistoj ankaŭ por liveri informojn kaj komentojn pri la esperantista vivo! (El Furiero de Esperanto, Romo)

Radio Bervalio respondas....

D: Kiom da esperantistaj kategorioj ekzistas?

R: Tri, nome agantoj, uzantoj kaj nenionfarantoj!

En propra nomo

Ĉi tiu numero estas la lasta de la jaro 1973. Mi dankas al ĉiuj abonantoj, legantoj kaj kunlaborantoj, kiuj restis fidelaj al Pilo-Press malgraŭ la pasintaj malfacilaĵoj en la unua jarduono.

Pilo-Press aperos ankaŭ en 1974 - la unua numero eliros ĵaŭde, la 3 jan 1974. Mi esperas, ke vi daŭrigos vian abonadon malgraŭ la pli altiĝinta abonprezo de 30,- GM por la Esperanta eldono kaj 15,- GM por la germana eldono END. Por ambaŭ eldonoj kune validas la abonkotizo 40 GM. Se vi ne jam pagis vian abonon, mi estus danka se vi baldaŭ ĝin ĝiros al unu el la jenaj kontoj

Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postscheckkonto Nürnberg 819 56-851
Stadtsparkasse Nürnberg 1.901.579 aŭ Bayerische Vereinsbank
Nürnberg 5.606.489

Mi ankaŭ atentigas vin pri Germana Esperanto-Revuo, kiu aperas 8foje jare. La abonkotizo por liberaĵ abonantoj en FRG estas 12,- GM, por eksterlandaj abonantoj 13,- GM. Se vi volas subteni Pilo-Press kaj Germanan Esperanto-Revuon, mi rekomendas la "subtenantan abonon", kiu estas la duobla abonprezo.

Mi estas danka ankaŭ por mondonacoj, kiuj estas uzataj por informado.

Esperanto en la radio

Berno. La lunda elsendo de d-ro A. Baur okupis sin pri problemo, kiu estas aktuala ankaŭ en multaj aliaj landoj: la poŝta krizo, kiu estas karakterizita de altiĝantaj prezoj de la poŝtaj servoj malpli altkvalitaj. La sorto de Esperanto-revuo same dependas de la poŝta prezopolitiko. Se oni daŭrigos la plialtigadon de la sendkostoj de revuoj kaj gazetoj kaj de presaĵoj, ankaŭ Pilo-Press kaj GER staros antaŭ malfacila situacio. - Ges-roj Gacond honore al la tago de la Esperanto-libro recenzis la Stafeto-libron "La arbo de la sciado" kaj citis el ĝi.

Romo. Ĉu alkoholo helpas en aŭtomobilismo? Per tiu demando Romo eble ŝokis unu aŭ la alian sobrulon. Sed tamen la demando tuŝis aktualan problemon fontantan el la naftokrizo. Oni jam nun diskutas pri la estonteco de la aŭtomobiloj, kies krizon oni antaŭvidis nur en 1980. Ĉu alkoholo, nome metil-alkoholo, estas unu el la eblecoj por trovi elirvojon? La tago de la homaj rajtoj estis temo de la E-kuriero.

Zagrebo Post la novaĵoj el Jugoslavio Emilija Lapenna recenzis kelkajn eldonaĵojn aperintajn en Jugoslavio: Ridu per Esperanto, Melo antaŭ tribunalo kaj Esperantonimoj.

Varsovio. Bedaŭrinde pro la posttagmezaj malbonaj aŭdeblecoj mi ne povis aŭdi aŭ nur parte la ĉiutagan radion-ĵurnalon kun la aktualaj informoj kaj komentarioj. Ĝuste tiuj programeroj estas interesaj por politikemaj homoj. La rubriko "Pri kio oni parolas en Pollando" ĉi-foje analizis la ekonomian situacion de Pollando antaŭ la festotagoj. A. Pettyn raportis pri la dimanĉa kunsido de la ĉefa estraro de PEA, kiu traktis la rezultojn de du enketoj, nome pri la junulara kaj instruada agado. El la 3 100 PEA-membroj pli ol la triono estas junulaj membroj. La lunda Esperanto-ekspreso memorigis la Zamenhof-tagon per ripeto de intervjuo kun la nepo de D-ro Zamenhof. Oni ankaŭ citis el Pilo-Press n-ro 31 pri la tasko de Esperanto-Ekspreso doni buntan trarigardon de la E-movado. Kial la Esperanto-revuo ĉi ne imitas la ekzemplon de Pilo-Press recenzii Esperanto-elsendojn? demandis A. Pettyn en la ĵaŭda leterkesto.